# KIAL MI STUDAS ESPERANTON

Antaunelonge, iu demandis min pri kial mi studas esperanton dum ekzistas tiom multe da premaj mondaj problemoj. Cu esperanto vere pli gravas ol la barakto por la homaj rajtoj au la protekto de la medio? Eble ne. Tamen, mi opinias, ke nia sola espero
por solvi tiujn kaj aliajn premajn terglobajn problemojn estas rekoni ties universalan karakteron, klopodi por interkultura kompreno, kaj kune labori kiel unu popolo por solvi tiujn. La komunikado, en formo de lingvo internacia, estas necesega por tiu celo.

Oni ne scias pri kiel homa lingvo komencis, sed la plejparto de lingvistoj sajnas konsenti, ke kunlaborado estis la bazo: homoj komunikas por ke ili laboru kune al komuna celo. Ciu generacio havis pli kaj pli grandan aron da samlaboranojn por kunlabori, ne nur samtempanojn, sed pli grave, pasintajn vojagintojn kiuj lasis al ni siajn skribajojn au cizajojn. Ni, kiel individuoj, kiel usonanoj, kiel amerikanoj, kiel membroj de la monda socio, staras ce la sojo de ekhavo de tutmonda socio, kaj esperanto povos esti la paso kiu portos nin transen. Lingvo estas nur la unua, kaj probable la plej malgranda obstaklo kiu baras al ni la vojon. Lerni iun ajn lingvon, speciale esperanton, facilas kompare al preterpasi rasan kaj etnan antaujugon, religian malamon, kaj kulturan luktadon. Lerni esperanton do, estus benega unua paso permesanta neutralan komunikadon inter irlandanoj kaj angloj, isrealanoj kaj araboj, au ec etnaj kalifornianoj kaj etnaj vasintonanoj.

Kleruloj opinias, ke ni preterpasas la epokon de nacio-stata superregado, kaj guste kiel la federacia polic-oficiro iam enkarceris banditojn, tiel same la Unigintaj Nacioj, la Monda Jugejo, kaj aliaj internaciaj organizajoj malhelpos la agojn de malsociaj landoj. Europo jam faris la unuan al hegemonio kondukantan pason. (Kaj kelkaj eble dirus la duan kaj trian, ankau.) Se esperanto akceptigus, tio certe plirapidigus tiun proceson kiu jam komencigis. Ju pli baldau ni ciuj havos komunan duan lingvon, des pli rapide ni povos komenci solvi la restajon de la premaj problemoj kiujn ni ciuj alfrontas.